Art. 3) Ĉiun konkursaĵon sendu ĝis la 30.09. 2002 al:
NAPOLA ESPERANTO ASOCIO, Via Pietro Castellino, 115, I-80131 NAPOLI, Italio
telef.: +39 815467760

Art. 4) En ĉiu sekcio estos aljuĝitaj fare de ĵurio kun diversfakaj kompetentoj:

UNUA PREMIO: diplomo kaj Napola artaĵo

DUA PREMIO: diplomo kaj Napola artaĵo

TRIA PREMIO: diplomo

LAŬDAJ MENCIOJ: diplomoj.

Art. 5) La Premiada Ceremonio okazos en Napolo. Loko, dato kaj horo estos ĝustatempe kaj adekvate diskonigitaj al la gajnintoj kaj al la publiko.

Napola Esperanto-Asocio

La prezidanto, Maria Luisa Russo

VERONA - Lunedì 20 maggio presso la Sala degli Arazzi del Comune di Verona, alla presenza del Sindaco e dell'Assessore alle Politiche Comunitarie del Comune di Verona, alle ore 11.30 sarà presentato alla Stampa il 5° Congresso Esperantista dell'Unione Europea, in programma a Verona dal 23 al 28 agosto, .

Il Comitato Organizzatore

ADESIONI AD "ALLARME LINGUA"

Il Comitato Nazionale di Difesa delle Lingue e delle Culture "Allarme lingua" (già da tempo approvato dal Consiglio Fei), presieduto da Nicola Minnaja e coordinato da Giorgio Bronzetti, sta prendendo delle iniziative di rilievo nel campo della politica linguistica dell'Unione Europea, come la promozione di interrogazioni parlamentari e denunce alla Commissione Europea relativamente a discriminazioni linguistiche, e sarà probabilmente presente alla conferenza internazionale delle associazioni di difesa delle lingue e delle diversità linguistiche (22 e 23 giugno a Bruxelles).

Coloro che volessero dare il loro appoggio a questa azione di sensibilizzazione sul problema del degrado delle lingue e per l'avvicinamento alla soluzione Esperanto sono pregati di aderire al Comitato. Basta una semplice comunicazione al coordinatore: nome e qualifica. Non si richiede altro. Se poi ci si vuole attivare e partecipare anche alla conferenza molto meglio.

Giorgio Bronzetti

gbronzetti@infinito.it

UNA POESIA PER LA PACE

Una tredicenne israeliana, Tali Shurek, ha scritto una bella poesia dedicata alla pace, di cui diamo qui la versione italiana e quella esperanto.

Israela knabino dektrijara, Tali Shurek, verkis belan poeziaĵon dediĉitan al la paco. Ni donas ĉi tie la versiojn itallingvan kaj esperantan.

Dipingere la pace

Ho avuto una scatola di colori,
magnifici, splendenti e belli.

Ho avuto una scatola di colori
per i toni freddi e per i toni caldi.

Non avevo il rosso per il sangue dei feriti,
non avevo il nero per il lutto degli orfani,
non avevo il bianco per il volto dei morti,
non avevo il giallo per le sabbie roventi.

Avevo l'arancione per la gioia della vita,
avevo il verde per le foglie e le gemme,
avevo l'azzurro per il chiaro del cielo,
avevo il rosa per i sogni e la quiete.

Mi sono seduto e ho dipinto la Pace.

T. Shurek

Pentri la Pacon

Skatolon da koloroj mi ricevis,
belegaj, brilegaj kaj klaraj koloroj.

Skatolon da koloroj mi ricevis,
por la tonoj malvarmaj kaj por la varmaj.

Mi ne havis la ruĝon por la sango de la vunditoj
Mi ne havis la nigron por la funebro de la orfoj
Mi ne havis la blankon por la vizaĝo de la mortintoj
Mi ne havis la flavon por la brulantaj sabloj

Mi havis oranĝan koloron por la vivĝojo
Mi havis la verdon por la folioj kaj la sprosoj
Mi havis la lazuron por la ĉielhelo
Mi havis la rozkoloron por la revoj kaj la kvieto.

Mi eksidis kaj Pacon mi pentris.

Esperantigo (el la itala) de G. Bottoni kaj R. Corsetti

LA 50A DATREVENO DE L' RAVENA ESPERANTO-GRUPO "DANTE ALIGHIERI"

La 14an de aprilo 2002: granda festotago por la ravenaj geesperantistoj, kiuj solenis la 50-jariĝon de sia glora Societo, hazarde koincidantan kun la 85a datreveno de la forpaso de l' kreinto de la Internacia Lingvo, al kiu la urbo Raveno, la 6an de junio 1971, aljuĝis gravan agnoskon ĉe la urba stratnomo per la inaŭguro de "Placo Ludoviko Lazaro Zamenhof".

Invitite de la prezidanto, s-ro *Stefano Bagnoli*, unu el la fondintoj de la ravena Centro kaj elstarulo de la emilia-romanja E-movado, ĉeestis la anoj de *Cerer* (regiona esperantista kunordiga instanco), gvidataj de *sam-o Mario Amadei*, kiu reprezentis ankaŭ la nacian Federacion kiel membro de ĝia Nacia Konsilio.

La kunveno efektiviĝis ĉe la konata Restoracio *Marchesini*, situanta en "Placo falintoj por la libereco". Kiel reprezentanto de la Urba Administrantaro ĉeestis la Vic-urbestro *Giannantonio Mingozzi*, kiu, per siaj tre aprecataj salutvortoj, rememorigis la sintenon de ĉiuj sinsekvaj urbaj Administracioj ĉiam favoraj al Esperantistoj, unuanime taksataj kiel gardantoj de valoraj kulturaj interesoj kaj konvinkitaj "Pacbatalantoj".

Kompreneble, akceptis la gastojn la Prezidanto *Stefano Bagnoli*, kiu, en sia vere ŝatata, altefluga kaj tre afabla saluto, prezentis rapidan kaj efikan sintezon de la ĉefaj fazoj de 50 jaroj da historio de l' Ravena Esperanto-Grupo kaj ankaŭ de la longa tempoperiodo antaŭanta ĝian oficialan inaŭguron. Tute aparte li emfazis la donacon faritan de la ravena Magistrato, la 9an de aprilo 1911, al ĉiuj partoprenantoj en la 4a internacia kongreso de Filozofio. Temas pri la "Gvidlibro de l'Urbo Ravenna", konsistanta el 56 paĝoj abunde ilustritaj, kun teksto ekskluzive en Esperanto, unu el la plej fruaj turismaj eldonaĵoj kun arthistoria intereso, verko de Prof-ro *Achille Tellini*, al kies memoro oni dediĉis la homologan, gravegan Esperanto-grupon en Bolonjo. Oni reliefigis la cirkonstancon, ke tiun donacon persone postulis ĉe la Urba Konsilio du gravuloj: la tiama Urbestro *Chiarissimo Calderoni* kaj la ekonomo Giovanni Pascoli.

Intervenis ankaŭ d-ro *Luigi Tadolini*, membro de la Akademia Senato de la Itala Instituto de Esperanto, per kelkaj historiaj klarigetoj, tute aparte rilatantaj la radikojn de la itala esperantismo, establiĝintajn ĝuste ĉi tie en Raveno je l' komenco de la pasinta jarcento, samtempe kun la vigla

aktiveco de la franca Grafo *Albert Gallois* - tiam aganta en la Modena teritorio - konsiderita kiel "patro" de la esperantista movado en Italio.

Al la Vic-Urbestro oni donacis la volumon "*L'esperanto in Emilia-Romagna - i luoghi, gli eventi, i protagonisti*", eldonitan en Bolonjo de *Cerer* dum 1989, verko de la sama Tadolini. La Vic-Urbestro volis afable reciproki, donacante al la aŭtoro de la libro valoran bronzan medalionon, prezentantan ĉiujn mondfamajn artverkojn de la ravena arkitekturo.

Antaŭ ol sidiĝi ĉe la tabloj de la "ruĝa saloneto" por luksega festena tagmanĝo, la kunvenintoj salutis la reprezentanton de la Urbo Raveno per la kanto de la "Himno al la ĝojo" el la 9a simfonio de Beethoven (en la esperanta teksto de Umberto Broccatelli), hodiaŭ alpreninta la rolon de "Himno al Eŭropo".

Dum la mateno, ĉiuj partoprenis en la vizito al la Monumentoj de la mirinda urbo, ankaŭ posttagmeze daŭrigita kaj gvidita de la sama Prezidanto *Bagnoli*, kiu ankoraŭfoje montris siajn dotojn de eminenta kaj klerega "ĉiĉerono".

Jam ekvesperiĝis, kiam la kunvenintoj atingis la stacidomon, kie ili sin salutis per frata brakumo kiu, ĉe ĉiuj esperantistaj manifestacioj, ĉiam estas festa ĝisrevido.

*Raporto de U.E.R.,
Unione Esperantista Romagnola*



Ravenna, la tombo de Dante Alighieri



Robert Phillipson, *LINGUE INTERNAZIONALI E DIRITTI UMANI INTERNAZIONALI*, originariamente *International Languages and International Human Rights*, in Kontra, M., Phillipson, R., Skutnabb-Kangas, T. e Varady, T. (1999), *Language: A Right and a Resource*, Budapest: Central European University Press, tradotto da Giuseppe Castelli www.divsavigo.it/approfondimenti

Non sono molti i linguisti professionisti, e per di più di madre lingua inglese, che hanno interesse per i cosiddetti “diritti linguistici dell’uomo”. Robert Phillipson, inglese e docente presso una delle università della Danimarca, è, forse, il più conosciuto a livello mondiale.

Uno dei suoi altri libri, *Linguistic Imperialism*, 1992, Oxford: Oxford University Press, è la bandiera agitata da tutti coloro che credono che anche nel campo linguistico e culturale sia non solo possibile ma anche necessario proteggere i diritti dell’uomo di tutti.

Questo secondo libro, scritto in collaborazione con altri linguisti interessati alle stesse tematiche, ha due scopi. Da una parte esso prova a concretizzare una definizione del concetto stesso di “diritti linguistici dell’uomo”, riassumibile rozzamente nel “diritto di parlare la propria lingua e non quella dei gruppi più forti”. Dall’altra parte illustra una serie di casi concreti di situazioni di oppressione linguistico-culturale a vari livelli: da quello delle minoranze zingare nei paesi dell’Europa dell’Est a quello delle maggioranze nazionali sempre più strette tra la globalizzazione economico-culturale e la preservazione delle specificità nazionali.

Phillipson aggiunge un altro livello, quello delle organizzazioni internazionali. Il suo contributo si occupa principalmente degli organismi delle Nazioni Unite e del Parlamento Europeo, ma il discorso è facilmente ampliabile a tutti gli organismi intergovernativi internazionali.

In queste organizzazioni viene, in un certo

senso, sancita la superiorità di alcune lingue (e dei loro parlanti) mediante vari meccanismi, in genere mediante la decisione sulle lingue di lavoro, ossia sulle lingue effettivamente usabili in quegli organismi.

In alcuni casi, organismi della famiglia delle Nazioni Unite, nonostante le lingue di lavoro siano almeno alcune, di fatto si tende a considerarle un ornamento utile in situazioni solenni, come l’Assemblea Generale, mentre a livello del funzionamento normale si tende a privilegiare solo l’inglese, la lingua dei forti.

Similmente si comportano le Agenzie europee, con conseguenze immediate sui cittadini di paesi come l’Italia, che trovano difficoltà spesso insuperabili per trovare impieghi a Bruxelles.

L’articolo di Phillipson mostra anche come l’unico momento nella storia di questo tipo di istituzioni, in cui si cercò di risolvere il problema in altra maniera, fu alla Società delle Nazioni nel 1924, quando si discusse dell’introduzione della lingua internazionale pianificata Esperanto. La discussione purtroppo fu interrotta dal veto della Francia, che temette per la sua lingua, che allora aveva una parte dello status dell’inglese oggi.

Non a caso la sezione dell’articolo di Phillipson, che tratta di questo episodio porta un titolo molto evocativo: *An Utopian Intermezzo...* Negli ultimi decenni anche se non sono mancati riconoscimenti “platonici” sul valore dell’esperanto principalmente da parte dell’Unesco, nessun passo più concreto è stato fatto.

Eppure la comunità delle persone che parlano esperanto si è andata allargando e motivi di equità e di riconoscimento di quei diritti linguistici dell’uomo, di cui si diceva sopra, militano a favore della soluzione esperanto.

L’esperanto, in fondo, è una questione di democrazia internazionale nel campo della lingua e della cultura.

Renato Corsetti



**LEGANTOJ
SKRIBAS**

**Viajn leterojn
adresu al:
Carlo Sarandrea**
Via di Porta Fabbrica 15
I-00165 Roma

Non solo Chiavari

Ho letto con piacere, su "l'esperanto" di gennaio 2002, la notizia riguardante la visita di Kimie Markarian a Chiavari, anche se si riferiva ad avvenimenti di quasi un anno prima (aprile 2001).

La signora Kimie Markarian, la settimana successiva alla sua permanenza nel Tigullio, è stata gradita ospite a Prato, dove ha preso parte attiva alla vita scolastica di una quinta classe elementare, che negli anni precedenti aveva imparato un po' di esperanto e svolto un interessante lavoro di corrispondenza internazionale.

Kimie ha parlato solo in esperanto ed insegnato tecniche e segreti del Soroban e dell'Origami. Una lezione è stata poi filmata e spedita alle scuole corrispondenti di Francia e Romania.

I ragazzi che hanno goduto degli insegnamenti e della simpatia di Kimie e che costituivano il gruppo scolastico "LA HERBEROJ", sono ora sparsi nelle scuole medie di Prato.

Come loro ex-insegnante chiedo idee e collaborazione per poter dare un seguito alla loro bella avventura nel mondo della lingua internazionale.

Leonardo Pampaloni
pampal@freemail.it

Euroscola

Ankaŭ ĉi-jare grupeto da junaj esperanto-parolantoj kunvenis en la Eŭropa Parlamentejo en Strasburgo. Jen raporto de la "gvidanto" de la itala grupo.

Mi unue dankas la organizantojn de *Euroscola* pro ilia grava kaj granda laboro.

Mi estas tre kontenta pro la aprila *Euroscola*-tago. Ĝi vere estis memorinda!! La itala grupo ekkonis la aliajn tri grupojn en la gastejo *Creps*, lunde vespere. Ni komencis prepari la *Euroscola*-tagon kaj ni daŭrigis la laboron mardon posttagmeze kaj vespere. Baldaŭ mi eksciis malbonan informon: en la Parlamentejo la tradukado okazas nur al du oficialaj lingvoj: angla kaj franca.

Dum la antaŭaj tagoj, ni havis ankaŭ okazon viziti la urbon, eĉ per boato.

Pridisputita regiono, longtempe teatro de konfliktoj inter eŭropaj ŝtatoj, Alzaco kaj Strasburgo estas hodiaŭ la kruciĝo kaj centro de okcidenta Eŭropo. Pro tiu pozicio, Eŭropa Unuiĝo elektis en la "arĝentora urbo" (kiel nomis ĝin la Romianoj!) la lokon de la eŭropa parlamentejo. La urbo enhavas multajn piedirajn stratojn, la aŭtoj estis parte forpuŝitaj el la centro por havi pli da spaco por bicikloj (300 km da biciklaj vojoj). Historio ĉi-tie aperas en ĉiuj stratoj per la originala arkitekturo (katedralo, kvartalo "Eta Francio", ktp.)...

La Euroscola-Tago

Ĉi jare, post matenmanĝo, ni tuj estis dividitaj en la laboraj grupoj, kune kun la aliaj gejunuloj ne esperantistaj: ni do ne estis kiel pasintjare. Laŭ mi tio estas bona afero, ĉar en tiu ĉi maniero ni povis/us/os pli multe influu ĉiujn grupojn. La prezentado de la esperanto-delegacio, kiun ni preparis dum la antaŭaj vesperoj, okazis original-stile: unu el la itala grupo prezentis la delegacion kaj poste unu junulo el ĉiu grupo diris saman frazon en esperanto kaj en sia nacia lingvo: "Ni tre ĝojas partopreni la Euroscolan tagon kaj ni elkore salutas vin". Poste estis tempo por demandoj: mi kaj aliaj junuloj faris demandojn pri lingvaj problemoj, sed kiel kutime, la respondoj de la parlamentaj oficistoj ne estis tre klaraj. Post la tagmanĝo (dum kiu ni vidis interese pri esperanto kaj ni donis informojn pri la lingvo) kaj la ludo "*Eurogame*" [kial angle?] ni laboris en laborgrupoj. Mi estis en la unua grupo: cirklo (demokratio, homaj rajtoj, problemoj en societoj) kaj mi estis elektita kiel sekretario. Mi provis meti en la rezolucion ion pri lingva demokratio, sed bedaŭrinde, ankaŭ pro la oficistoj de la parlamento, mi ne sukcesis. Poste, en la granda salono, ĉiu grupo prezentis sian laboron al la aliaj kaj la aliaj junuloj voĉdonis favore aŭ malfavore. Mi starigis alian demandon pri lingvo, al kiu respondis itala esperantisto: do li parolis favore al esperanto. Ankaŭ aliaj grupoj parolis pri la ebleco de esperanto: ekzemple en la grupo pri estonteco, oni diris ke Eŭropo bezonas komunan lingvon, ĉu la anglan aŭ la esperantan.

Estis vere tre grava afero ke oni parolis pri esperanto en la eŭropa parlamentejo!!

Dum la merkreda vespero, venis al CREPS ĵurnalisto de DNA (loka gazeto) kiu intervjuis min kaj aliajn partoprenantojn.

Ankoraŭ DANKON al la organizantoj de *Euroscola* kaj al la esperantistaj geinstruistoj,

Francesco Maurelli

INFORMOJ PRI LA 5a EŬROP-UNIA E-KONGRESO

PAGO DE ALIĜKOTIZO

je la nomo de la kasisto: **s-ro Sergio Antoniazzi, Via Brigata Casale 1, 37137 Verona**, per: a) Poŝta konto n. 25673328; b) ĉeko en eŭroj; c) internacia poŝtmandato. Bonvolu - al la sama adreso - sendi aliĝilon kun fotokopio de la pag-atesto.

Se estas problemoj pri transpago, bonvolu skribi por interkonsento.

Ĉe la fervoja stacidomo de "Verona Porta Nuova" funkcios la 23an de aŭgusto, de la 9a ĝis la 19a horo, akceptejo organizita de lokaj esperantistoj.

HOTEL-MENDO - La hotelmendilo aperis en la n-ro 2/2002 de *l'esperanto*. Ni resumas. La prezoj estas en eŭroj, por unu nokto, inkluzive de matenmanĝo.

Hotelo 3-stela "superior" ĉambro 2-lita 110,00; 1-lita 100,00

hotelo 3-stela "standard" ĉambro 2-lita 105,00; 1-lita 85,00

hotelo 2-stela ĉambro 2-lita 90,00; 1-lita 80,00

Oni sendu pagon por unu nokto plus 16 eŭrojn por administraj kostoj al la agentejo IANTRA (vidu adreson je paĝpiedo)

KAMPADEJOJ

Bonvolu informiĝi pri eventualaj kostoj kaj rezervado de loko ĉe:

Campeggio Giulietta e Romeo

Strada Bresciana 54 - Ca' dell'Etreo - VERONA

camping-verona@tin.it - tel. +39 0458510243

Campeggio Castel S.Pietro

Via Castel San Pietro 2, VERONA

info@campingcastelsanpietro.com - tel. /faks. +39 045592037

LOĜADO EN STUDENTA DOMO

Ĝi troviĝas je 15-minuta distanco de la kongresejo, sed eblas ankaŭ utiligi buson.

En ĉambroj dultitaj, kun propraj servoj, sen matenmanĝo,

por persono por nokto: 30 eŭroj.

Atentu: enloĝigo ek de la 16 h. de la tago 23.8.02

Estas malmultaj lokoj, bonvolu TUJ MENDI AL LA ORGANIZA KOMITATO.

LOĜADO EN PORJUNULA KOLEGIO

Ĝi troviĝas je 20-minuta distanco de la kongresejo, sed eblas ankaŭ utiligi buson.

En ĉambroj dultitaj, sen matenmanĝo, komunaj servoj,

por persono por nokto: 20 eŭroj.

Estas malmultaj lokoj, bonvolu TUJ mendi al IANTRA AGENTEJO (kiel por hoteloj)

AMASLOĜEJO

Ĝi troviĝas je 20-minuta distanco de la kongresejo, sed eblas ankaŭ utiligi buson.

En ĉambroj plurlitaj, sen matenmanĝo, komunaj servoj,

por persono por nokto: 11 eŭroj.

Atentu: oni devas kunporti dormosakon!!!!!!!

Estas malmultaj lokoj, bonvolu TUJ mendi al IANTRA AGENTEJO (kiel por hoteloj)

AGENZIA IANTRA VIAGGI - P.za Donatori di Sangue 5, 37124 Verona, tel. 045 8303306, faks. 045 8388581, e-poŝto *info@iantra.it* .

Por informoj: **Organiza Komitato:**

Verona Esperanto-Grupo, CP 1616, 37100 Verona, Italio

aŭ e-poŝte: ***esperantoverona@adriacom.it***



SUPREN, SUR LA MONTARO

De la 27a de Marto ĝis la 2a de Aprilo 2002 okazis en Fenestrelle en provinco de Torino, la 26a Internacia Junulara Festivalo (IJF).

Temas, certe, pri unu el la plej gravaj junularaj E-aranĝoj, eble la plej granda en la printempo. Ĝuis la Festivalon entute 155 partoprenantoj el 16 landoj. Notindas la mirakla partopreno de unu suda italo (eble la unua post multaj jardekoj), kiu tuj decidis disvastigi la Bari-an dialekton (mi pardonpetas: lingvon), ĉar, laŭ li, la Bari-a lingvo estas la esperanto ĉe Apuloj, fakte ĉu vi ne scias tiun vi povas kompreni nenian kaj nenion. Ĉu vi volas ekzemplon? “*silentu*” oni diras Bari-lingve: “*statt citt*” (elparolu: stat’ ĉit’), facile! Ĉu ne?

La kondiĉoj estis tre bonaj: luksega ejo (fakte ne ŝajnis junulara renkontiĝejo) kun bonaj manĝoj (sed iom malpli por vegetaranoj...), belega kaj suna estis la vetero, sed bedaŭrinde la ejo estis tro malproksime de Torino (2-hora vojaĝo necesas por atingi ĝin). Laŭ mia impresoj la partoprenantoj ĝenerale tre kontentis pri Festivalo, pro la ĉi-supraj kialoj kaj pro la programo. Treege plaĉis (eĉ furoris) la koncerto de famega E-bando “Esperanto-Desperado”, kiu kantis kaj ege amuzis kaj frenezigis la publikon (ĉefe prezidantinon de IEJ) “*ĝis la nokto noktofin*”!! Notinda estas la ĉeesto de famega usonana kantistino Anastacia, kiu diris: “Ĉu vi aŭskultus miajn kantojn retroe, vi aŭskultus tiun kanton sed esperante!!”.

Teatraĵon prezentis la TNT, kaj ĉijare TNT elektis prezenti unu el la plej famaj verkoj de Luigi Pirandello, ĝuste “*Ses roluloj serĉantaj aŭtoron*” reduktita de TNT (precipe de Daniele Pesce) al “*Tri roluloj serĉantaj aŭtoron*”; la teatraĵo sukcesegis per kvalito de la verko kaj de la geaktoroj.

La lastan vesperon, okazis “La internacia vespero – La Corrida”, prezentita de du junuloj, unu, famega kaj mondkonata, t.e. Francesco Maurelli kaj iu, kiu nomiĝas (ĉu mi bone memoras, ĉar pri li mi neniam aŭdis) Nicola Ruggiero. Sur la scenejo estis flut-ludistino, mokantoj pri italoj kaj mokantoj ĝenerale, famega kaj mondkonata estro de orkestro Andreji Grigorievski (laŭvere eŭska afabla viro), kaj multaj el ili reklamis sia-naciajn renkontiĝojn tre amuze.

Bela kaj interesa estis la “Fabrizio Pagliaroli show”, prezentita de lerta Fabrizio Pagliaroli, kiu dank’ al homoj kiel Renato Corsetti (moŝto Prezidanto), kaj Gunter Neue ktp ktp sukcesis krei simpatian kaj ridindan medion.

Nokte funkciis bona diskejo por la nokta popolo, sed la trinkejo, bedaŭrinde, funkciis nur ĝis la noktomezo, kun granda domaĝo de la subskribonto, kiu, serĉanta bieron kaj blondulinon, vagadis tra la festivalejo, sed senrezulte.

Malgraŭ la taga programo estis sufiĉe plena, multaj esperantistoj havis tempon por ludi per goo (ĉina ludo, preskaŭ kiel ŝakoj), ŝakoj, tablo-teniso, kartoj, kaj ili eĉ krokodilis.

Dank’ al la helpo de la lokaj arbogardistoj, dum la festivalo oni povis viziti la belan Naturan Rezervejon ĉe Prà Catinat. Ekskursoj daŭris 3-4 horojn, kaj preskaŭ 25 homoj partoprenis en ĉiu ekskurso. Mi tre ĝuis ekskurson ĉar mi vidis neĝon (en mia zono malofte neĝas) kaj mi babilis kun multaj homoj kaj pri naturo kaj pri esperantismo.

Ne belega, sed rimarkinda estas la paska diservo, celebrata de pastro Walter, kiu, bedaŭrinde, ne sciis (kaj—as) esperanton, sed malgraŭ ĉio, li rajtigis legi la legaĵojn (la evangelion eĉ legis iu junulo ĉeestinta) kaj la predikon tradukis al esperanto Fabrizio Pagliaroli. Tiel ankaŭ la esperantistoj havis sian (preskaŭ)meson.

Dum la krokodilemula IEJ-sembleo elektiĝis nova estraro de Itala Esperantista Junularo. Unu el plej elstaraj prelegoj estis tiu de la juna sed vigla Giulio Ludoviko Amerio, kiu prelegis dum unu horo kaj duono eĉ ekster la festivalejo (eĉ post la fino de la Festivalo). La asembleo elektis prezidanto Bethuelon Chiesa-n kaj estraranoj Manuel-on Giorgini-n, Alessandra-n Masini-n, Flavia-n Dal Zilio-n, Selena-n Contin, Andrea-n Bertaglia-n, Francesco-n Maurelli-n kaj Francesco-n Reale-n.

Kiel partopreninto en la IJF, mi tre ĝojas pri kiel ĝi funkciis, kaj mi certe aliĝos venontjare!

Angelo Crirugio

“Se Parizo havus la maron. . .

. . . ĝi estus malgranda Bari”. Tiel sonas fama proverbo en mia regiono, Apulujo. De mia regiono mi foriris pensante ĝuste pri tiu ĉi sentenco. Jes, lasi la maron kaj la apulan ebenaĵon por alveni Torinen, kaj de tie foriri ĝis Fenestrelle per aŭtobuso...

Kaj kial? Kial lasi tiun eron de paradizo? Nature por esperantumi en IJF !!! Fakte danke al IEJ-IIE-premio mi sukcesis konvinki miajn gepatrojn lasi min dum la paskaj ferioj.

Bedaŭrinde, mi alvenis kiam la Festivalo jam komenĉiĝis, kaj mi estis tre laca pro 16-hora vojaĝo (fakte miaj okuloj luktis kun mi) kaj mi malsategis, sed danke al Dio, mi alvenis je tagmanĝa horo, kaj mi povis gustumi bonan manĝon. Do, sata kaj malstreĉita mi ekesperantumis: mi finfine konis esperantistojn, kies nomoj mi nur estis leginta ĉu en revuoj ĉu en ret-mesaĝoj.

Per la lingvo Esperanto mi trovis harmonion, ludon, (mi ankoraŭ ne trovis amon, sed... kiu scias!) kaj mi tre amuziĝis danke al diskejo, homoj parolemaj kaj tre miritaj pro mia sudedo, fakte oftaj demandoj estis: “Ĉu estas esperantistoj tie?” aŭ “Bone! Sed... kion signifas ‘streŝnedd’?”.

Jes, tie ĉi en Bari estas esperantistoj, malmultaj sed bonaj kaj lertaj (pli malpli)!!! Kaj ‘streŝnedd’? Ĝi estas pastaĵo nomita esperante “oreletoj”, rondaj en formo de ĉapeleto. Se vi volas scii iom pli, kontaktu min: esperantobari@libero.it.

Belega sperto, fakte tiu ĉi estis mia unua junulara renkontiĝo, kaj mi tre kontentas esti partopreninto!!! Krom mia ‘ofico’ kiel partopreninto kaj simpla esperantisto, ano de ajna publiko, mi devis prezenti “La internacia vespero – La Corrida”, kune kun Francesco Maurelli. La problemo estis, ke nek mi nek Francesco havis sperton pri tio. Pro tio, mi pilgrimis (antaŭ ol alveni Torinen) al hejmo kie naskiĝis protektanto de prezentistoj, Pippo Baudo, kiu post du horoj lumigis min, kaj anoncis la “bonan mesaĝon”:

unue, vi ne havu alian prezentistan modelon krom mi; due, vi ne profanu mian nomon;

trie, vi sanktigu la **Internacian Junularan Festivalon** per reklamo pri **SanRemo-Festivalo**;

kvare, nepre, nepre, sciu kion diri, se ne, petu, kaj serĉu bonan sufloron kaj bonega(j)n kaj (aŭ) lerta(j)n helpantino(j)n.

Post la granda anonco de la Majstro, mi povis prezenti kaj disvastigi la “parolon” al mia amiko. Fakte, malgraŭ tio ke mankis sufloro, helpantino, ne mankis altareto al sankta Pippo, kiu tre helpis al ni!!! Resume, ĝi estis tre bela sperto, kaj se la granda Pippo donos al mi ankoraŭ tiom da kuraĝo, mi volonte prezentos venontjare.

Sed mi havis problemon kaj unu el miaj problemoj pri Festivalo estas la distanco: Torino, Venecio aŭ alia norda urbo tro situas for de mi, kaj de miaj amikoj komencantoj. Pro tio, la Junularo Esperantista Apula, kore invitas vin al:

1^a KONTRAŬFESTIVALO de JEA en Bari

Ĉiuj, kiuj estas interesataj, povas kontakti min ĉe la ret-adreso: esperantobari@libero.it.

Okazos koncertoj de lokaj bandoj, kaj estos trinkejo aŭ vesperkunveno, kie poetoj kaj kantistoj diros siajn proprajn verkojn, vi povos gustumi lokajn pastaĵojn, kuiritaj de “Avinjo Rosa,, ktp ktp!!!

Kie? Kompreneble en Bari, en luksega hotelo “Sheraton Hotel-Nicolaus,,!!

Kiam? Kompreneble dum grekaj kalendoj...

Nicola Ruggiero

3405696575

esperantobari@libero.it

Nova Sento a cura della Gioventù Esperantista Italiana



Redazione:

Michele Bondesan

via Baroni, 26

45100 Rovigo

Telefono: 0425-23566

Posta elettronica: mikebond@tin.it

Conto bancario intestato a

Gioventù Esperantista Italiana,
ABI 3002, CAB 2002, c/c 650791/
19, SWIFT: BROMIT2V, Banca di
Roma, Filiale di Venezia, Agenzia
n. 8

Conto corrente postale

n. 11110251 intestato a
Gioventù Esperantista Italiana
presso Manuel Giorgini, S. Polo
606, 30125 Venezia